

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 4an de decembro 2008 per Skype.

(Aprobata la 15an de januaro 2009.)

Partoprenis:

Jardar E. Abrahamsen (JEA, en Trondheim),

Eli Fitjar (EF, en Bergen),

Ulf Lunde (UL, en Os),

Anne Karin Bondhus (AKB, en Bryne),

Asbjørn Lindh (AL, en Oslo),

Ingebjørg Rambjør (IR, en Bergen),

Arne Olav Mjøen (AOM, en Trondheim).

Anne Karin Bondhus kaj Arne Olav Mjøen partoprenis ekde la komenco de punkto 3.

0. Tagordo

La dissendita tagordo estis aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 13an de novembro

Aprobata.

2. Telefono en Esperantonia

La prezidanto informis:

Ĉar ni atendis kaj ne tuj transiris al Telio, la tempo permesis aliajn okazaĵojn. Dum la atenda tempo Fortel faris interkonsenton kun iPLink, kaj ĉar ni ne jam transiris al Telio, ni povis facile transiri al iPLink, sen ŝanĝo de elektronikaĵoj. La transiro okazis la 1an de decembro, kaj ni petis la malmultekostan telefonabonon iPLink Norge.

3. Precizigo

La Oslo-klubo petis precizigon de la fina parto de punkto 6 en la protokolo de 23.10.2008 («Por tamen montri sian bonvolon...»), ĉar stariĝis demando, kiel ĝi rilatas al la lasta alineo de punkto 3 en la sama protokolo («500 eurojn el tio...»).

La estraro precizigas, ke nia intenco estas ke la teksto

«...ĉiom de la kapitalo, kiun NEL heredis de Eldonejo Esperanto, iru rekte al la komuna Domkonto, kaj ke parto de tiu sumo estu uzota por...»

signifu

«...ĉiom de la libera kapitalo (do krom la mono jam dediĉita por antaŭe difinitaj celoj), kiun NEL heredis de Eldonejo Esperanto, iru al la komuna Domkonto, kondiĉe ke parto de tiu sumo estu uzota por...».

La kasisto kalkulu la ekzaktan sumon kunlabore kun Harald Rygg.

4. Eventulaĵoj

Jarraporto 2007 (sic!)

Ni ĵus ricevis la jarraporton de la Tromsø-klubo por 2007. Estas tro malfrue por menciigi tion en la jarraporto de NEL, kiu estas presita en NE n-ro 4/2008, sed ni menciigu ĝin en la jarraporto por ĉi tiu jaro.

Ankaŭ Bergen sendis raporteton per retpoŝto, kvankam ili ne havis formalan jarkunvenon ĉi-jare.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2055h.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 15an de januaro.

Raportis Ulf Lunde, sekr.